



Morris West, 1916-1999
Aŭstralia verkisto



Esperanto sub la Suda Kruco

Julio-Aŭgusto 2004
Numero 70 (Volumo 12, no.4)



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 70 (volumo 12, numero 4), Julio-Aŭgusto 2004

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio
Telefono: (08) 9641 1937
Faksoj: (08) 9641 1134
E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.
E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100- aŭ 250-mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵojn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

Sur la Kovrilo

Morris Langlo West (1916-1999) estis eminenta aŭstralia romanisto. Liaj romanoj *La advokato de la diablo*, *La ŝuoj de la fiŝisto*, kaj aliaj, tre famiĝis; pluraj el liaj romanoj estis sukcese filmitaj kaj diskonigitaj tutmonde.

EN ĈI TIU NUMERO

Unika birdo Kakapo (Phillip Temple).3	
What Is the AEA? (Penny Vos Pym).. 7	
Trevor Steele raportas el Hindio.....9	
Komento pri eseo de la redaktoro (Kep Enderby)..... 11	
Deziras korespondi..... 12	
Recenzo: <i>100 Jahre der Zeit voraus. 100 Jahre Esperanto in Hamburg 1904-2004</i> 12	
For the Beginner: Jargon 2 (db)..... 13	
Interrete..... 17	
Konkurso “Liro”..... 18	
Kleriĝu per Esperanto (Hazel Green) 19	
Afiŝoj (Penny Vos)..... 20	
Esperantologia studo (Marcel Leereveld)..... 22	
El la regionoj.....28	
Nekrologo: Teresa Metherall..... 28	
Pseŭdlobokserp..... 29	

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per Interreto ĉe:

<http://www.sudakruco.org>

Limdato por la septembro-oktobra numero: 15 aŭgusto.

UNIKA BIRDO KAKAPO

[Strigopa papago, Strigops habroptilus]

de Phillip Temple

red. kaj tr. de la Esperanto-Klubo Masterton



La Maoria vorto kakapo signifas “papago de la nokto”, kaj la birdo estas tiom unika ke ĝi posedas propran genron, *Strigops habroptilus*. Fakte, la sola senflugiva papago de la mondo aspektas kiel muskverda strigo, kaj la pezo similas al granda koko. Kelkfoje ĝi sonas kiel fajfkrianta porko, aŭ henanta azeno aŭ siblanta posumo. La kakapo estas tute vegetalmanĝa, kaj elektas fruktojn, semojn, foliojn, tigojn kaj radikojn laŭ la sezono.

Ĝi maĉas sian nutraĵon kaj glutas nur la sukcon. La fortikajn fibrojn ĝi elkraĉas kiel buletojn. Ĉar ĝi ne ĉiam plukas folion de la planto, la buleto ofte restas sur la planto kiel klara indiko ke kakapo estas proksima.

La birdo vagis tra la tuta lando antaŭ ol la pioniroj el Britio importis furojn, ermenojn, katojn kaj hundojn. Tiuj bestoj facile rabokaptis kaj la plenaĝajn kaj la sendefendajn idojn. Jam en la komenco de la 20an jarcento, la kakapo malaperis de la Norda Insulo. Tamen, ĝi ankoraŭ vivis en izolitaj montolokoj de la Suda Insulo, do ornitologoj sciis malmulton pri ĝia vivmaniero.

En la jaro 1961, oficistoj de la Fako Naturgarda fortostreĉe piediris en la regionon Fjordlando. Tie en la pluvtremplita sovaĝejo ĉe la sudo de la Suda Insulo, ili kaptis kvin kakapojn. Bedaŭrinde, post la translokiĝo al rifuĝejo por indiĝenaj birdoj en la Norda Insulo, la birdoj mortis. Ĉiuj estis viraj!

En 1974, la Fako nomumis la kakapon plej protektenda. Neniuj kakapoj estis viditaj dum la antaŭj ses aŭ sep jaroj, kaj laŭ raportoj neniu vidis inan kakapon jam de sepdek kvin jaroj.

Don Merton, entuziasma ornitologo ekde siaj knabjaroj, kaj oficisto de la Fako Naturgarda ekde 1958, ricevis la taskon aranĝi novan serĉon por trovi la eviteman papagon. Kiel estro, li rekondukis Rod Nilssonon, Rod Morrison kaj Rodney Russon al Fjordlando.

En malproksima valo Esperance preter la arbokresko limo de la monto, ili trovis kakapon. Ĉu ina? Oni opiniis ke ne, do ili nomis la birdon Jonathon.

Per unuaklasa registriilo, ili surbendigis la unikajn blekojn de Jonathon, kaj je

taŭga nokto aŭdigis ilin trans la valo. La ario tuj allogis kakapon. Tiu kakapo aspektis same kiel Jonathon, kun la sama malsimple makulita plumaro, kurbaj flugiloj, grizbruna strigsimila vizaĝo, kaj kvazaŭ-tabak-kolora mentono. Ĝi ankaŭ havis grandan kurban bekon taŭgan por skrapfosi radikojn kaj tuberojn, pluki foliojn de de arboj kaj maĉi kulmojn de tufgraminoj.

Optimisme, la teamo nomis la novan birdon Jill, kaj sendis la paron al Insulo Maud, senrabobesta rifuĝejo en Markolo Pelorus. Nek Jonathon nek Jill montris pareman konduton, do la teamo konkludis ke ankaŭ Jill estas vira. Ili renomis ĝin Bill.

Dum la sekvaj tri jaroj, Don Merton organizis pli ol kvardek ekspediciojn en la nebuletajn valojn de Fjordlando. Helikopteroj veturigis naturgardistojn kune kun volontuloj al la alimaniere neatingeblaj terasoj kaj pendovaloj, alte 1000 metrojn aŭ pli sur la preskaŭ perpendiklaj flankoj de la montoj.

La ŝanĝiĝema vetero de Fjordlando preskaŭ forpelis la serĉantojn. Tre varme dum la tago, kaj preskaŭ froste dum la nokto. Unu el la tendolokoj suferis pro 550 milimetroj da pluvo kiu falis dum dek horoj. Alifoje, pro pluvego, John Kendrick, kiu estis respondeca pri fotografado kaj sonbendigo, devis kunpremi sin dum kvardek du horoj en unu kvadratmetra kanvasa kaŝejo, ĉar la rivereto inundis kaj li ne povis eliri el tiu valo. Alifoje, lavango puŝis tunojn da glacio kaj rokoj preskaŭ ĝis la loko kie Ron Nilsson matenmanĝis. Ankoraŭ alifoje, pluvego atendigis Ron Nilssonon kaj Rodney Russon sur montoteraso malpli larĝa ol kvindek metroj. Ĝis helikoptero povis ellevi ilin, ili devis kaŭri dum cent ok horoj sur siaj porteblaj litoj, ĉar akvo rapide fluis tra la tendo.

Sed la teamoj ja trovis kakapojn. Dum la tri jaroj ili trovis lokojn de dek ses papagoj — ĉiuj estis viraj. La birdoj estis amikemaj, unu pririgardis la kaŝejon kaj bekprovis la lenson de la lumopliigilo uzata por observi dum la nokto. Alifoje, la sama birdo suprenrampis la korpon de Rod Morris, uzante siajn flugilojn por ekvilibriĝi. Dum ĝi grimpis tiun strangan arbon, ĝi provis per sia beko la kruron, la dorson, la ŝultron kaj fine la kapon de la indulgema viro.

Tantalige, ŝajnis ke la virbirdoj atendis kunulinojn, ĉar ili faris siajn neordinarajn allogajn sonegon kaj dancadon. Dum la kapo balanciĝis, la vosto svingiĝis kaj la flugiloj leviĝis en paroksismo de klopodo, la virbirdo emisiis eĥantan sonon, kvazaŭ persono blovis trans aperturon de botelo. Sonego post sonego eliĝis de ĉiu birdo. po 1000 sonegoj hore. Unu birdo vokis senĉese dum 17 horoj kaj ŝajnis al la rigardantoj ke ĝi maldikiĝas tie antaŭ iliaj okuloj.

Multo da peno allogi la inojn! Inoj nepre estis en la ĉirkaŭaĵo.

La birdoj faris la sonegadon sur montolokoj en kavaĵoj kiujn oni antaŭe nomis pulvorumejoj. Ĉiu birdo uzis siajn bekon kaj ungojn por pligrandigi la kavaĵojn, do oni konkludis ke la kavaĵoj estis kavigitaj de multaj generacioj. Pro ili estis apudsurfacoj rokaj. La kavaĵoj efektive amplifikis la sonegojn, tiel ke oni povas aŭdi ilin kvin kilometrojn for. Kelkaj el la virbirdoj uzis plurajn kavaĵojn



Virkakapo kaj kakapino

por plidisvastigi siajn sonegojn.

Sen inoj, la kakapoĵoj dancis fronte al birdoformaj branĉetoj kaj eĉ al vestaĵoj kiujn Don Merton kaj siaj kolegoj metis apud la kavaĵojn. Malrapide la birdo promenis malantaŭen direkte al la falsa kunulino, dum li malrapide levis kaj mallevis la flugilojn por elmontri sian frapantan plumaron. Sed nek arda sonogado, nek eleganta dancado allogis iun inon. Tiu ĉi parado okazas nur dujare aŭ trijare.

Ŝajnis ke rabobestoj atingis eĉ tiujn malproksimajn valojn en Fjordlando, kaj eble sen helpo de homoj la kakapo malaperos.

Januare 1977, pro manko de sonogado, Don Merton ĉesigis la serĉon en Fjordlando.

Rodney Russ, Ron Nilsson kaj ses naturgardistoj komencis serĉi aliajn rarajn birdojn sur Insulo Stewart. Kvankam neniu kakapo estis vidita dum la antaŭaj tridek jaroj, Rodney Russ kun sia teamo baldaŭ trovis certajn spurojn kaj kavaĵojn de kakapoĵoj. Poste, ili aŭdis super la fajfado de la konstanta vento la eĥantan allogan sonegon.

Ricevinte la informon, Don Merton averturis al Insulo Stewart por doni instrukciojn al la teamo pri la serĉado je kakapoĵoj. Ili trovis postsignojn de almenaŭ tridek birdoj. Rodney Russ estris la serĉadon dum la sekvaj du jaroj, ĉar Don Merton faris taskojn sur Insulo Kristnasko en Hinda Oceano.

Dum la unua serĉo, januare kaj februare 1977, kakapoĵoj estis trovitaj en la ĉirkaŭaĵo de Rivero Robertson, tamen ĉiu estis virbirdo.

En la 1978-79aj serĉesemajnoj, la teamo esploris la ceterajn lokojn de Insulo Stewart. Rodney Russ kun siaj helpantoj ne povis serĉi pli ol unu-du kilometrojn tage ĉar ili devis rampi sur manoj kaj genuoj tra densaj arbetoĵoj saturitaj

de pluvo. La vetero estis eĉ pli malbona ol tiu de Fjordlando; pluvo kaj vento batadis ilin preskaŭ senĉese. Rodney Russ kaj liaj kolegoj nek vidis nek aŭdis kakapon, do la superuloj de la Fako Naturgarda ĉesigis la projekton.

Don Merton rekomencis administri la konservoprogramon post sia reveno al NZ. februare 1979. La teamo nepre volis havi sukceson same kiel dum la 1960-oj. Tiutempe la Fako Naturgarda sukcese lokigis raran birdon, la seldorsan filesturnon (*Philesturnus carunculatus*) sur dekkvar senrabobestaj insuletoj. La birdoj daŭre prosperas, kvankam ankoraŭ neniu vivas sur la ĉefaj insuloj de NZ. Unuafoje homoj, per rekta interveno, savis genron kontraŭ proksimega malapero. Se ili povos trovi eĉ unu birdinon, Don Merton asertis, la Fako spertos duan triumfon.

Marton 1980, Don Merton kaj lia teamo denove estis sur Insulo Stewart, kune kun tri hundoj kiuj estis dresitaj por eltrovi kakapon. Ili starigis tendaron en la arbetaĵo pluvtempita, kaj rapide komencis la serĉadon. Pro la neceso veturi per helikoptero, la mono havebla ebligis nur 6-semajnan ekspedicion. Do maltrankviligis la teamon ke ili ne kaptis birdon dum la unua semajno. Je la tagiĝo la 27an de Marto, Don Merton denove iris kune kun Gary Aburn kaj lia hundo Jasper en la arbetaĵon. Pasis kelkaj malvarmaj horoj sen eĉ ekvido je kakapo. Subite Jasper “indikis”; tiam li ekkuris kun sia direktanto tuj post li. Post kelkaj momentoj Gary revenis kun baraktanta, grakanta birdo en la manoj. “Mi opinias ke ĝi estas ino!” li kriis.

Don Merton ekzamenis la birdon. Ĝi havis mezan longecon, proksimume 60 centimetroj, sed kompare kun la jam kaptitaj birdoj, ĝia grandeco estis nur du-triona. Ĝi havis pli mallarĝajn kapon kaj bekon, iomete pliverdan plumaron, pli maldikajn palrozajn kruojn kaj piedojn. Krome, la aliaj birdoj kiujn Merton jam palpis, estis kvietaj kaj kondukeblaj. Ŝajnis ke tiu ĉi birdo estis kolereza, ĉar ĝi piedbatis kaj bekpikis la manojn de Gary Aburn. “Tio certigas,” ride diris Don Merton, “Ĝi estas ino!”

Kelkajn horojn post tiu ĝojiga kupto, helikoptero fluge alvenis ĉe la tendaro por transporti plumojn al analizistoj, ankaŭ por doni gratulan botelon da ĉampano.

Provoj pri sekshormonoj konfirmis ke la birdo ja estis ino. “Kiam mi vidis tiun birdon en la manoj de Gary, kaj sciis ke la kakapo eble havos bonan estontecon, mi opiniis ke mi tuŝis eternecon.” diris Don Merton.

POSTNOTO

En la jaro 1989, la nombro da kakapoj estis nur 40 birdoj. Je 2001 la nombro pli iĝis al 62. La tuto estis sur tri senrabobestaj insuloj en diversaj lokoj proksime al la ĉefaj insuloj de Novzelando. Somere 2001-2002 idoj plenkreskiĝis sur Insulo Codfish, rifuĝejo 3km for de Insulo Stewart. Ĉar la nombro da birdoj nun estis 86, oni decidis translokigi kelkajn birdojn al Insulo Chalky 2km for de Fjordlando. Antaŭ nelonge tiu ĉi insulo iĝis senrabobesta. Unu el la 4 birdoj alportitaj el Insulo Maud por vojaĝi kune kun la 10 el Insulo Codfish estis Richard Henry. Li estas la sola vivanta birdo de Fjordlando, do lia genotipo gravas por la tuta kakapa

speco. Li kaj liaj 3 idoj eĉ aspektas malsimilaj al la aliaj birdoj. En julio 2002, 6 virbirdoj kaj 8 birdinoj translokiĝis al Insulo Chalky.

Depost tiu jaro neniu birdino demetis ovon. Necesas ke kaj fagoj kaj podokarpoj fruktu samtempe, por ke la kakapoj sukcese nutru idojn. Sed tio okazas nur 5-6foje jare. □

WHAT IS THE AEA?

by Penny Vos Pym

1. *What is the AEA?*

The Australian Esperanto Association Inc. is a non-profit organization incorporated in the Australian Capital Territory to:

- promote the use of the international language, Esperanto;
- increase, among its members a strong sense of solidarity, and to develop in them understanding and esteem for peoples of other countries;
- foster co-operation between Esperanto organisations, and to
- organise nation-wide congresses and other congresses and conferences.

Some not-for-profit organizations are “Charitable and Benevolent” and this status affects their eligibility to receive certain grants and taxation advantages. Charitable and benevolent purposes are those that seek to do good towards others in the community. This may include relieving poverty or sickness, addressing the needs of the young or the aged, advancing education or otherwise benefiting the community.

Other not-for-profit organisations exist, perfectly legitimately, solely for the benefit and enjoyment of their members.

Deciding what kind of non-profit organisation AEA is will help us find role models and ideas about how to help it flourish.

1. Does AEA have a mission to fulfill?
2. Is the AEA most like (circle your choice) :

A church?

Alliance Française?

The Flat Earth Society?

A bridge club?

Lions/Rotary/Apex ?

The Japanese Language Teachers Association?

World Vision?

Other?

2. Why do we aim “to promote the use of the international language, Esperanto”? (and, therefore: How much is enough?)

Is our “promotion” of Esperanto about achieving peace? Are we out to change the world?

Is it a matter of whim?... urgency? importance?...mission?

Do we need to find ways of doing more than we can at present?

3. *Are we on Track?*

Close up, or from the inside: AEA does good (gives us an interest, expands our world-view, provides a forum for co-operation and connection and raises social justice issues in and beyond our group) and causes little or no harm, only perhaps by distracting us from other causes of value.

In the big picture, or from the outside; the world is troubled by war, injustice, hunger, poverty, sickness, natural disasters, corruption. One, humanly possible, step towards alleviating all of these ills would be to spread the common language as assertively as possible. AEA bears Australia's share of the responsibility. Most of Australia does not yet know that it exists.

Is the close-up view enough?..

4. *Where are we going?*

Zamenhof created Esperanto as a common second language for the whole world and AEA is responsible for realising that vision in Australia.

We are far more likely to succeed if we can share our ideas about the details of our vision so that we do not waste important opportunities.

How does your group imagine Esperanto in Australian society when our “promoting” is done?

How can we get there?

“Never doubt that a small group of committed individuals can change the world, indeed they are all that ever has.”

As part of such a group, what would you like to do to help bring about your vision of Esperanto’s future in Australia?



Por Ridigi Vin



“Mi petas mineralakvon.”

“Kun suko aŭ sen?”

“Kun suko.”

“Kun kiu suko?”

“Kun la oranĝa.”

“Mankas la oranĝa.”

“Do, kun la framba.”

“Mankas ankaŭ la framba.”

“Do, mi petas sen suko.”

“Bone! Sen kiu suko?”

[El *La ondo de Esperanto*]

TREVOR STEELE RAPORTAS EL HINDIO:

Bovinoj, kakado, kaj punoj

Ni ĉiuj aŭdis pri sanktaj bovinoj, kaj kvankam la signifo ŝanĝiĝis, ni probable memoras, ke la koncepto originis en Hindio. Kiam mi estis lerneja infaneto, oni rakontis al ni, ke hindoj tiel respektegas bovinojn, ke la bestoj rajtas fari ĉion laŭ sia volo, ekzemple kaki sur la aŭtovojoj, tute sen puno. Je tiu etapo de mia glora kariero mi ne vere supozis, ke kaki sur aŭtovojoj estas grandioza amuzaĵo, sed mi estus malaprobinta, se la aŭstralia registaro decidintus, ke ni ne rajtas puni bovinojn kulpajn pri tia agaĉo. Alia mirigaĵo de la vivo de hinda bovino, kiun oni rakontis al ni: ne gravas, kiel maldikas aŭ malsanas bovino, ĝi neniam estas mortigita, kaj manĝi bovaĵon estas neimagebla peko por ĉiuj hinduoj.

Nu, jen ni en Hindio, kaj la sperto sur aŭtovojoj faras el ĉiu vizitanto tremetantan nervobulon. Sed kio pri la bovinoj, ilia kako sur la vojoj, kaj ilia imuneco kontraŭ puno kaj manĝiĝo? Kelkaj pecoj estas veraj, kelkaj pridubindaj. Estas tiom da aliaj danĝeroj sur la trafikeroj, ke bovokako estas agrabla distraĵo, sed ĝin tuj distretas kaj dissternas sennombraj radoj. Sed ni gapis: bovinoj fakte vagadas sur la stratoj kaj aŭtovojoj (samaj aferoj), eĉ en la plej neatendeblaj lokoj, ekzemple ĉe ĉefaj vojkruciĝoj dum pinta trafiko, kaj ili evidente konscias pri sia sankteco kaj nepunebleco: kompreneble ili estas, same kiel ĉia alia vivantaĵo kaj nevivantaĵo, priklaksonataj de historie senpaciencaj veturigantoj, sed ili suverene ignoras tion kaj amblas kien ili volas, kaj kakas laŭ sia plaĉo. Kaj – ĝis tiu ĉi punkto la lernejoj rakontoj pravas – la veturigantoj ankaŭ permesas al la bovinoj tian fian konduton, eĉ bremsas pro ili. Piedirantoj ne ricevas tian privilegion traktadon: ili povas maksimume antaŭe pisi kontraŭ strata muro, kaj poste, se ili aŭdacas surpaŝi la aŭtovojon, tuj surdigas ilin kakofonio de klaksonoj kaj, se ili ne kapablas rapidpiede evitadi, tuja morto rikoltas ilin.

Ne ĉiuj bovinoj, almenaŭ ne ĉiuj bovinoj ĉiam havas tiel idilian vivon. Ni ofte vidis reprezentantojn de tiu specio punataj kaj preskaŭ ĝismorte enuigataj. Oni ligas ilin al fosto apud konstruaĵo, kiun ni malavare nomu domo, kaj la longo de la ŝnuro estas tia, ke ili kapablas nur surgenuiĝi kaj ree ekstari; ili havas nenion ajn por manĝi aŭ trinki, nur senvivan teron sub la hufoj. Tiaj bovinoj ne povas kaki, ĉar ili tute ne manĝas kaj estas preskaŭ travideblaj. Kelkaj el la malbonŝanculinoj devenas el malvarmaj landoj – ekzemple la frisaj kaj holŝtejnaj – kaj ŝajnas tute ne ĝui la 40-gradan veteron de suda Hindio. Ili provas senigi sin je la peza felo, sed ne aparte sukcesas.

Do kelkaj bovinoj estas punataj, kaj mi hezitas konkludi, ke tio okazas pro antaŭaj fiagoj sur la aŭtovojoj. Sed kio pri tiu pleja puno, esti mortigita kaj manĝita? Eble temas pri ŝtata sekreto, do mi raportu nur, ke iu s-ro X (adreso: No. 216, off Main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, India) konfidencis al ni, ke

kvankam teorie neniu hinduo manĝus bovaĵon, sekrete ili ĉiuj pekas tiurilate. Kaj mi supozas, ke ne eblas manĝi bovinon, se oni ne jam mortigis ĝin.

Konkludo: niaj instruistoj en la baza lernejo estis aŭ ne plene informataj aŭ ne plene verparolaj.

Maratono sen reguloj

Mi skribis supre pri la ĉarmoj de hindaj aŭtovojoj: kiel mi antaŭvidis, eĉ mi iomgrade imuniĝis, kaj kvankam mi ankoraŭ blankamane kroĉiĝas al la maldika stango de rikiŝa kupeo, mi ne ĉiam nepre atendas morton je la venonta vojkruciĝo.

Veturi en hinda trafiko similas al partopreno en maratona kuro. Imagu vin ĉe la startlinio dense ĉirkaŭita de centoj da konkursantoj. La pistolo pafas, kaj tuj ĉiuj ŝultropuŝas kaj kubutumas kaj tratanĉas por devanci la ceterajn, dekstre aŭ maldekstre, ne gravas. Sed tiu ne estas la plena bildo. Imagu, ke samtempe alia maratunkuro ekas sur la sama kurejo, sed en la malan direkton. Teorie estas dividlinio inter la du eventoj, sed neniu atentis tion, do vi devas eviti ankaŭ la homojn de la alia konkurso.

Do jen la tuta bildo? Ne. Vi devas mense aldoni amason da truoj en la kurejo, kiujn ĉiuj fanatike evitas, eĉ se foje la rezulto estas, ke vi devas defie alfronti homon kurantan rekte al vi, ĝis fine iu el vi cedas kaj evitas kolizion nur per stumblo en truon.

Fino de la rakonto? Neniel. Nun vi devas imagi, ke estas amaso da stultuloj, kiuj intencas transpaŝi la kurejon dum vi kuras, kaj — kredu min aŭ ne — bovinoj aŭ suverene starantaj aŭ solene amblantaj transe aŭ laŭe, aŭ kakante aŭ ne kakante. Se vi volas, kriegu minacojn al la bovaj ĝenulinoj, ili ignoros vin, kaj ial vi kaj la ceteraj konkursantoj ne punas ilin.

Fino de la tropo. Vi kaj la ceteraj “kurantoj” fakte estas en kamionoj aŭ busoj aŭ aŭtoj aŭ rikiŝoj aŭ sur motorcikloj aŭ bicikloj, kaj vi veturas multe pli rapide, ol homoj povas kuri.

Agrablajn songojn.

Postnoto de la redaktoro: mia edzino, kiu loĝis 17 jarojn en Hindio kaj Nepalo, aldonas: “En Nepalo, kaj verŝajne do ankaŭ en Hindio, oni disvendas bovaĵon sub la etikedo ‘mutton’ [vorto ĝenerale uzata pri ŝafaĵo, kapraĵo, bovaĵo]. Ankaŭ: Kiam ŝi loĝis en triba vilaĝo, kiam oni volis vendi bovaĵon (do, por tio, bovino devis esti mortigita), oni etikedis ĝin “legomo”. Do se iu venis demandante ĉu vi volas aĉeti “legomon”, oni sciis ke efektive temas pri bovaĵo. Se la vendanto vere volus vendi legomojn, li nomus specife kiujn legomojn.” □

KOMENTO PRI ESEO DE LA REDAKTORO: “ĈU VERE LINGVO = PENSO”¹

de Kep Enderby

Ĉar mi nun preparadas du malsamajn prelegojn kiujn mi promesis doni ĉe kaj la Kultura Centro Esperanta [KCE] kaj SAT dum Aŭgusto, prelegoj kiuj temos pri simila temo kiel tiu traktita de Donaldlo kaj Marcelo, leginte iliajn du interesajn eseetojn, mi faras la sekvantajn komentojn:

Ne povas esti dubo pri la praveco skribita de ambaŭ Donaldlo kaj Marcelo escepte de, mi opinias, la tria punkto farita de Marcelo je paĝo 11 de *ESK* 69, kiu asertas ke “Esperantistoj ĝenerale favoras kaj prizorgemas la retenon de la granda nombro da mortriskaj lingvoj kaj dialektoj. Same kiel verŝajne Don, la parolantoj de grandaj lingvoj ne interesiĝas pri la diverseco de lingvoj, eĉ postulas la ŝanĝon al siaj lingvoj. Sed ĝuste la Esperantistoj, pro tialo nebula, amas tiun diversecon kaj pretas zorgi pri ĝi.”

Mi opinias ke implicite en tio estas opinio, ke kiel objektiva fakto, la reteno de tiom kiom eblas da tiuj mortriskaj lingvoj kaj dialektoj estas dezirinda. Se mi pravas dirante tion, eble aŭdace, mi kontraŭos ĝin.

Historie, “socia progreso” havas grandan gravecon, kaj ke kvankam ĝi povas iam aĝi tre kruele, “socia progreso” postulas ke tio, kontraŭ kion Marcelo aprobas, ja okazu.


Kiam mi legis tion skribitan de Donaldlo, ree nur implicite, mi konsideris, ke li opiniis same kiel mi. Bonvolu Donaldlo, certe plaĉus multajn legi viajn reagojn kaj komentojn.²

Dum la UK en 1954, Ivo Lapenna parolante pri la historia evoluo de la homaro diris: “Se ni ĵetas nur la plej supraĵan regardon al la evoluo de la homaro, ni facile rimarkas, ke ĝia historio esence konsistas en laŭgrada pasado de la plej simplaj kaj primitivaj, malgrandaj kaj mallarĝaj formoj de socia kunvivado, al ĉiam pli ampleksaj teritorie kaj ĉiam pli grandaj, nombre, sociaj unuoj.”

Tabua opinio, eble, esprimi ĝin en Esperanto-rondoj, sed mi opinias, ke la samo aplikendas al lingvoj.

Por tiuj, kiuj interesiĝas pri tiuj demandoj kaj problemoj, mi rekomendas du bonegajn librojn de Giordano Moya, ambaŭ eldonitaj de Barcelona Esperanta-Centro: *Survoje al Universala Civilizacio— Esearo kaj Esperantismo — Prelegoj kaj eseoj*. □

1 [*ESK* Numero 69], kaj Respondo de Marcel Leereveld [*ESK* 69].

2 Jes, vi pravas. Laŭ mia opinio, ĉu ekzistas aŭ ne plu ekzistas iu lingvo ja ne gravas. Sed komentojn kc. mi donos nur en posta numero de *ESK*. —



Deziras Korespondi



- **Martí Guerrero i Cots:** Mi studas pri la tervaloraj impostoj kiuj funkcias en diversaj landoj. Gravajn interesojn mi havas pri la sistemo uzata en Aŭstralio kaj Novzelando; ĉar mi legis ke en kelkaj regionoj de viaj landoj la kontoj de la impostoj devenantaj de la tervaloro estas kalkulataj aparte de la konstruaĵoj. Ĉu iu el viaj legantoj povos klarigi iom al mi pri tion

Anticipaj dankoj de

martigc@yahoo.es

Martí Guerrero i Cots

Roselles 42 baixos

08907 L'Hospitalet Llob

Hispanio



Recenzas via redaktoro



Benno Klehr (redaktoro): 100 Jahre der Zeit voraus. 100 Jahre Esperanto in Hamburg 1904-2004. Hamburg: Esperanto-Verein Hambg e.V., 2004. 58p. plus kompakta disko.

Ĉi tiu libreto eldoniĝis okaze de la centjariĝo de la Hamburga Esperanto-Societo. La tekstoj estas en la germana kaj en esperanto; kun kelkaj esceptoj, ĉiu artikolo aperas en ambaŭ lingvoj, sed kun iom nesama teksto. Multaj nigra-blankaj fotoj akompanas la tekstojn. Preskaŭ senescepte, la artikoloj temas pri personoj kaj eventoj gravaj en la loka historio de la hamburga grupo; interesas ankaŭ fotokopio de letero de la Gestapo, kiu informas ke je la 28a de februaro 1932 “ĉia agado por la lingvo Esperanto” estis malpermesita “de la Regna Prezidento por la sekurigo de popolo kaj ŝtato”, do tuj post la ekposteniĝo de Adolf Hitler.

La kompakta disko kiu akompanas la libreton estas tre interesa, kaj uzeblas per ĉiuj komputiloj (kaj Macintoshaj kaj IBM-kongruaj). Ĝi enhavas la tekston de la tuta libreto, iom da kantado, kaj 44-minutan paroladon “Mia Esperanto-vivo” de Dro Werner Bormann. Hazarde, li estas samaĝa kiel via redaktoro, kaj eklernis Esperanton samjare (en 1945)! Lia parolo estas klara, kaj la enhavo tre interesa.

Ŝajnas ke la libro+disko ne estas ĝenerale disvendata; sed interesatoj sendube povas akiri ekzempleron per peto al la hamburga societo. □

FOR THE BEGINNER

Jargon (2)

by Donald Broadribb

Hopefully helpful explanations of what grammatical terms mean, for those who were never drilled in the Latin-Greek based analysis of English that used to be demanded of high school students until around 30+ years ago.

Intransitive: This refers a particular type of verb.

Traditionally many languages distinguish two types of verb: those that show activity relating to something or someone else, and those that don't. For example, "hit, sing, see, sting" all show actions which a person does to someone or something, unlike "am, become, age". The first set, verbs that show actions, are called transitive; the second set, that do not, are called intransitive. Unfortunately, there are many verbs about which it is not clear which category they belong to, such as "think, stand, sit, hope, start, stop, end," and many more. And, to make it worse, specific verbs may be assigned to different categories by different languages. In English many verbs fit into both categories.

Theoretically, in Esperanto transitive verbs are supposed to be followed by -n, which is added to the word that shows what the action is done to. For example: "Li kantis arionn el *La Piratoj de Penzanco*". In Esperanto "kantis", "sang" is considered to be a verb showing an action done to something, so requires the -n.

Following this principle, in Esperanto the verbs which do not show actions ought not to be followed by -n. For example "Li *estas* mia amiko". "Estas", which means "is", is considered to be an intransitive verb, it does not show an action.

Partly because languages disagree as to exactly which verbs are to be considered *transitive* or *intransitive*, and partly because almost any word can be used as a verb in Esperanto, regardless of whether or not it can be used that way in any other language, there is a great deal of possible confusion.

It appears that the initiator of Esperanto, Zamenhof, felt that the transitive/intransitive distinction between verbs could be largely abolished³.

3 Ekzerco 29 of the basic rulebook of Esperanto, *La fundamento de Esperanto*, states: "se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri „obei al la patro“ kaj „obei la patron“ (anstataŭ „obei je la patro“). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri „pardonu al la malamiko“ kaj „pardonu la malamikon“, sed ni devas diri ĉiam „pardonu al la malamiko lian kulpon.“” = "If we do not know whether a verb requires the accusative following it (i.e. whether it is active) or not, we can always use the accusative. For example, we can say "obei al la patro" and "obei la patron" (instead

According to Zamenhof, any verb that could be followed by a preposition may instead be followed by -n instead — but with some implied exceptions.

For example, according to *La fundamento de Esperanto* we are allowed to say either “Li iris hejmon” or “Li iris al hejmo”. English speakers find “li iris hejmon” obvious, “he went home”, because “went” shows an action; but speakers of many other languages find “li iris al sia hejmo” (“he went to his home”) more natural, because in their languages “went” is felt to be like “become”: because it does not affect anyone else, it is intransitive. *La fundamento de Esperanto* permits both ways of using the verb.

Interestingly, most Esperantists avoid both expressions and say, instead, “li iris hejmen” — a fascinating and almost inexplicable use of -n which has led many authors of Esperanto grammar books to invent the new category, “accusative of direction”, which simply means using -n to show direction. Using -en to show where someone goes to has become standard in modern Esperanto.

We do best to simplify the whole matter by these rules:

1. Any verb may be followed by -n on a noun which directly follows it: li rigardas al mi *or* li rigardas min = “he looks at me”; li aŭskultas ŝin *or* li aŭskultas al ŝi = “he listens to her”; Mario fidas Dion *or* Mario fidas je Dio = “Mary has faith in God”

except:

est-, or any verb that uses -iĝ- in it: Hundo estas besto = “A dog is an animal”; Kennedy fariĝis Prezidento = “Kennedy became President”. Remember that -n may **never** be used in following “esti” or “-iĝ-”.

2. A tiny number of verbs have peculiar ways of being used.

Li finis la kanton = “he finished the song”; Kiam li finis? = “When did he finish?” La kanto finiĝis = “The song finished.”

Johano komencis leteron = “John began a letter”. Ĉu li jam komencis = “Has he begun yet?” La pluvo komenciĝis. = “The rain began”.

3. If in doubt, use a different sort of expression that means the same thing but avoids the problem altogether: Li finis kanti, li komencis skribi leteron, etc.

Dictionaries usually give a note for each verb as to whether that verb is “tr” = transitive, or “ntr” = intransitive. Unfortunately, no two dictionaries agree completely about which are which.

Modify: you might think this refers to changing something, but in grammar it has

of “obei je la patro”). But we do not use the accusative when the clarity of meaning forbids this; for example, we can say “pardoni al la malamiko” and “pardoni la malamikon”, but we must always say “pardoni al la malamiko lian kulpon”.

a very different meaning.

In Esperanto an adjective is said to “modify”, or to “agree with” the noun it is used with. This simply means that the adjective must end with *-j* or *-jn*, if the noun does: “*granda espero*” = “a big hope” (adjective+noun); “*grandaj esperoj*” = “big hopes”(adjective + plural noun”; “*li havas grandajn esperojn*” = “he has big hopes” (adjective+plural noun with *-n*).

Some grammarians also misuse this term, talking about adverbs. “Modify” and “agree with” really refer only to adjectives, in Esperanto.

Generally speaking, “modify” does not have any place in English grammar.

Nominative: In Esperanto, this merely means that a word ends with *-a*, *-aj*, *-o*, or *-oj* — In other words, has no *-n* attached to it. “*Libro, granda, belaj, homoj*” are all “nominative”s. Often they are just called “simple” forms

Noun: Traditionally “noun” is defined as “the name of something”. This definition is probably as good as any, provided we do not take it too seriously.

In Esperanto, a “noun” is any word made by adding *-o*, *-on*, *-oj*, or *-ojn*. “*Libro, telefono, penso, skribisto*” are all “nouns”.

In Esperanto, any word can be used as a noun, by adding *-o* etc. to it, regardless of whether there is a single word that corresponds to it in any other language.

In translating Esperanto texts, it is often necessary to use several English words to give the maning of one Esperanto noun. For example: “*skribkapablo*” means “ability to write”.

Object: The word “object” has a special meaning in grammar. It refers to what sort of word follows a transitive verb. Grammarians distinguish what they call two kinds of “object”: the direct object, and the indirect object.

In Esperanto, a “direct object” means a noun or adjective that has *-n* on it. In “*mi vidas lin*”, the word “*lin*” is called the direct object of the verb “*vidas*”. In “*Mario aĉetis kilogramon da faboj*”, “*kilogramon*” is the direct object of the verb “*aĉetis*”.

An “indirect object” means a noun or adjective which is speparated from a verb by a little “*preposition*” word such as “**en, al, de, el, por, per, kun** and a few others. For example: in “*Mia amiko donis al mi libron*”, the word “*mi*” is called the indirect object of the verb “*donis*”, while “*libron*” is the direct object of the same verb. The order usually does not matter in Esperanto, we can say either “*Mia amiko donis al mi libron*” or “*Mia amiko donis libron al mi*”.

However, keep in mind such sentences as “*Mia onklo venis Parizon*”, which

can also be written “Mia onklo venis al Parizo”, something discussed on page 14 above. In such instances, the distinction between “direct” and “indirect” objects becomes meaningless.

Participle: This is a term that has been used with so many meanings in so many languages, that it may be best not to use the term at all in regard to Esperanto. Unfortunately *La fundamento de Esperanto* does use the term, and there has been endless argument as what exactly is meant by it.

Traditionally, in grammar, “participle” has something to do with verbs. For a number of reasons, we do best to forget that and to approach the matter from a totally different angle.

What in Esperanto are called “participles” are words that are made by placing -ant-, -int-, -ont-, -at-, -it-, -ot- before the ending(s). It does not matter whether the word is an adjective such as “skribanta”, an adverb such as “parolinte”, a noun such as “rigardito”; and in recent times verbs such as “pensotas” or “vidintis have also become common.⁴

-ant- and -at- refer to something taking place now: “La skribanto de la letero” = “The person writing the letter”. “Mia amiko estas bone konata kiel aŭtoro” = “My friend is well known as an author”. “Ne volante pagi maltro, mi sendas al vi blankan ĉekon” = “Not wanting to pay you too little, I am sending you a blank cheque”.

-int- and -it- refer to something previous: “Jen la nomoj de la librogajnintoj” = “Here are the names of the book winners”. “La romanoj verkitaĵoj de Ngaio Marsh” = “the novels written by Ngaio Marsh”. “Skribite via poemo imponas” = “In writing, your poem is impressive”.

-ont- and -ot- refer to something yet to come: “Nia naskoto estos nia unua infano” = “Our baby-to-be-born will be our first child”. “La eldonota libro estas kompostata nun.” “The book to be published is being typeset now.” “Farote aŭ ne farote, ne koncernas nin hodiaŭ.” “Whether or not it will be done is of no concern to us today.”

One special oddity of Esperanto participles: by tradition, those that end with -o are normally considered to be people (or animals), rather than inanimate objects. There is no good reason for this, it is simply custom. To indicate an inanimate object it is usual to include -aĵ-: “la legotaĵo” or simply “la legaĵo” = “the stuff that will be read”. Of course, personified objects are also possible: “La parolanto estas komputilo” = “The speaker is a computer”.

(To be continued.)

4 The initiator of Esperanto, L.L. Zamenhof, once wrote that he personally did not like to use such verb forms, but that he agreed that they are possible. They were rarely used during the first hundred years of Esperanto, but in the last 20-30 years have become quite common. Most textbooks don't discuss the matter.


Interrete

- **Projekto Dialogo** estas kunmetaĵo de kelkaj agadoj ekestintaj en la lastaj jaroj en la kadro de la diskutoj pri la kongresaj temoj kaj en la kontaktoj kun Ne-Registaraj Organizaĵoj ĉirkaŭ Unesko.

Se vi interesiĝas labori sur tiu kampo, Esperanto kaj dialogo inter kulturoj, vi estas bonvena. Bonvolu kontakti: Renato Corsetti —

Rete: renato.corsetti@esperanto.org

[Fonto: *ret-info*]

- **Socioniko** estas psikologia sistemo pri homaj tipoj. Oni povas legi multajn detalojn pri ĝi ĉe <http://socioniko.narod.ru/>. Ĝin elverkis Aŭgustinaviĉiute Aŭgusta surbaze de kunmikso de trovoj/studoj/teorioj/hipotezoj/divenoj de C.G. Jung kaj Antoni Kepliński. Ŝi distingas 16 persontipojn, kaj krome diskutas pri interrilatoj de ĉiu tipo kun la aliaj, kc. kc. Ĉe la socionika retpaĝo oni povas trovi simplan (kaj, tie diriĝas, “ne tute kredeblan”) teston por trovi onian propran persontipon. Via redaktoro troviĝis esti “intuiciema-logikiva introvertulo (malracia)”. La testo, kaj la teoriaro, estas distraĵ — kaj se vin interesas “pop-psikologio” (populara psikologio), eble vi povos trovi ion utilan. — 

- **Radio-programoj en Esperanto per Interreto:**

Ĉinia: ĉe <http://es.chinabroadcast.cn/> oni ĉiutage povas aŭskulti unuhoran aktualan esperantlingvan programon, ĉefe politikan kaj ĉinapropagandan. Se vi volas aŭskulti la mondajn novaĵojn laŭ alia vidpunkto ol tiu kutima en la aŭstralia raportado, ni rekomendas aŭskulti ĉi tiun elsendon. Kompreneble, vere neŭtralan raportadon oni trovas nenie; sed valoras aŭdi la vidpunktojn laŭeble de ĉiuj flankoj. La parolo estas klare aŭdebla, la lingvaĵo estas unuaranga, ankaŭ la prononco. Oni povas aŭskulti la aktualtagan programon, aŭ tiujn de la pasinta semajno, kiam ajn oni deziras.

Koreo: <http://esperanto-radio.net/> havas tre interesan servon. Se vi iros al ĝia paĝo, kaj klakos sur “Uzu supersignojn”, vi trovos metodon konverti viajn cxtekstojn (k.s.) al ĝuste supersignitaj esperantaj tekstoj, kiujn vi povas kopii kaj meti en retpoŝtaĵon, se via komputilo ne jam mem kapablas fari la esperantajn literojn. Krome, vi povas elŝuti tre nelongan unuteman programon (varias laŭ la tago) por aŭskultado per Real Player. La parolo estas klare aŭdebla, la prononco mezkvalita, la lingvaĵo sufiĉe bona.

- **Agadoj por la lokaj esperanto-grupoj:** Ĉirkaŭ ducent Esperanto-grupoj troviĝas nun, ofte kun sinprezento, sur la grupaj mapoj ĉe:

<http://Esperantoland.org/grupoj>.

Fakte temas pri la tt-ejo, kie kolektiĝas informoj pri Esperanto-grupoj, kiuj ŝatas ricevi vizitantajn esperantistojn.

2) Memoru krome, ke por helpi la laboron pri la kontaktoj inter la espe-

rantistoj loĝantaj en ĝemelaj urboj, pri kiu zorgas Wu Guojiang, amikeco999@21cn.com, estas alia ttt-ejo, http://www.aliaflanko.de/lokaj_grupoj/, kie estas la informoj pri la grupoj kaj samtempe pri la urboj, kun kiu ĝemelas la urbo, en kiu estas la registrata grupo. En tiu ejo nun estas 64 grupoj. La programo estis farita de Karin Weirich, en la ttt-ejo de ŝi kaj de Robert Bogenschneider.

Bonvolu registri vian grupon ĉe: <http://EsperantoLand.org/grupoj> kaj http://www.aliaflanko.de/lokaj_grupoj/

3) Krome ekzistas la listo lokaj-esperanto-grupoj@yahoo.com por interŝanĝi spertojn kaj informojn inter aktivuloj de lokaj Esperanto-grupoj, al kiu aktivuloj de via loka grupo povus aliĝi.

4) Fine ne forgesu pri la paĝo <http://www.esperantoland.org/eo/plu.php?msgid=536> en kiu vi povas trovi eblecojn por trovi korespondantojn por viaj komencantoj.

LIRO-2004

La redakcio de La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso "Liro".

Liro-2004 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo.
2. Originala poezio.
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: "Neznakomka" de Aleksandr Blok.
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: "Birjuk" de Ivan Turgenev.
5. Traduka prozo el la angla lingvo: "The Devil in the Belfry" de Edgar Allan Poe.

En ĉiu originala branĉo oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, p.k. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 15 okt 2004.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

Speciala noto: la anglalingvan tekston de "The Devil in the Belfry" de Edgar Allan Poe vi povas akiri de la redaktoro de *ĜK* senpage. Petu ĝin ĉe:

sudakruco@sudakruco.org.



KLERIĜU PER ESPERANTO

de Hazel Green

En *ESK* de Marto 2004 aperis anonco de retkurso pri “Komputiko kaj Programado” ĉe <http://www.esperanto.org.il/KERO>. Mi povas varme rekomendi tiun interesan kurson.

Unue, la interreta paĝaro mem bone funkcias. Estas facile rapide trovi iun ajn paĝo, eĉ per mia malnova komputilo. Estas facile uzi la interagajn kvizojn, eĉ post malligo al la interreto. Ĉio estas klare legebla. Kaj nova ebleco, en majo 2004, estas ke la kurso estas libere elŝutebla, tielke oni povas trankvile lerni sen daŭra interreta konekto.

La enhavo de la kurso tre interesas — ni gajnas klaran mensan bildon pri la partoj de komputiloj kaj kiel ili funkcias, kaj samtempe lernas kiel paroli en Esperanto pri komputado. Per la metodo “programita lernado” ni povas facile sekvi la kurson kaj lerni, ne sen peno, sed ja sen ĝeno.

Por instrui la principojn de programado, la kursverkisto, D-ro Gian Piero Savio elektis la programon “Java”. Dum jaroj la vorto “java” estis stranga al mi — mi nebule opiniis ke ĝi iel rilatas al la TTT, sed mi ne komprenis tion, kio ĝi fakte estas. Mi supozis, ke nur komputilaj spertuloj povas scii. Sed post legado de ĉapitro 5: “Enkonduko en Java-n”, ĉio estis klara, ne nur pri la programo, sed ankaŭ pri la kafo, kaj la insulo en Indonezio.

La kurso estas amuza, interesa, sed ankoraŭ ne kompleta. Ni ne rajtas plendi pri tio, ĉar la aŭtoro devas laboregi, por ke ni povu lerni sen tro da laboro. En la “oftaj demandoj” ligitaj al la hejmpaĝo, ni povas legi la daton kiam la venonta ĉapitro aperos. Kaj ĝis nun ĉiu promeso estis plenumita. Oni lanĉis la kurson kadre de la Komputika Esperanta Rondo (KERO) de la ILEI-revuo *Juna Amiko* kaj menciis la jenajn ecojn:

- a. La kurso ne postulas iun ajn antaŭan teorion scion pri komputiloj.
- b. La programlingvo Java estas fakte ege grava por TTT-ejaj uzoj en Interreto.
- c. La kursa materialo estas en nivelo de supera lernejo, tamen la instrumentado celas komprenigi la temojn kaj praktikigi la sciojn al ĉiu “serioza kaj laborema” ĉiuaga komencanto.
- ĉ. La kurso estis projektita laŭ la metodo “programita lernado”, kiu, postulante daŭran retroagon fare de la lernanto, rezultigas aktivan lernadon, pli rapidan kaj firman komprenadon kaj enmemorigadon.

Kial ne mem provu?

□



AFIŜOJ KREITAJ DE LERNANTOJ EN LA MONTESSORI-LERNEJO TREETOPS


PRI *LOTE* (LANGUAGES OTHER THAN ENGLISH)



INSTIGITAJ KAJ KOLEKTITAJ DE LA ESPERANTO-INSTRUISTO

PENNY VOS





Troveblaj ĉe <http://velado2.tripod.com/>.

Esperantologia studo

LA SPECIALECO EN LA ESPERANTA VORTFORMADO

de Marcel Leereveld

Kiel tipe aglutina lingvo, Esperanto havas riĉe la tri formojn de vortformado:

1) Finaĵŝanĝado: varma → varmajn; inkl. alikategoriĝon de vortspecoj: labori → laboro.

2) Derivado: aldono de afikso al radiko: labori → laborilo; veni → reveni.

3) Vortkunmetado: kunmeto de du aŭ pli da radikoj: pumpo por akvo → akvopumpo; (tempo) post la mezo de tago → posttagmezo.

Ĝeneralaj karaktereroj.

Aglutina lingvo estas lingvo, en kiu oni formas vortojn el aliaj vortoj per la simpla kungluado, kunmetado, de du (aŭ pli da) radikoj, tiel kreante novan unuecan vorton por nova unueca nocio. En tiu procedo la partoj mem de tiaj kungluadoj ne ŝanĝiĝas kaj retenas sian individuan signifon, nun unuigitan kun aliaj signiferoj en la nova vorto .

Ni substreku, ke parolante pri kunmetado, la gramatikistoj celas la signifan kaj parolan kaj skriban unuecon de la nova vorto. Ni nomas tion sintezo (ekz. lernejo). Se ni parolas pri kombinado de vortoj, la vortoj restas apartaj, kaj ni povas nomi tiun esprimmanieron analiza (ekz. ejo por lerni).

Laŭ aglutina regulo, ĉiu sintezaĵo (ekz. tablotuko) elvenas el analizaĵo (tuko por la tablo). Tio validas en Esperanto eĉ por la finaĵoj: laboro estas o (= io) konsistanta el ago labori. Same “besta” estas eco vidata kiel karakterizaĵo de iu substantivo.

En aglutina lingvo la signifo de la sinteza formo ne simple konsistas el la adiciigo de la signifoj de la partoj. Do *dormĉambro* ne signifas la dormon plus la ĉambron, nek *patrino* signifas la patron plus la inon. Se temas pri simpla adicio, kio ne ofte okazas, ni ne sintezigas, sed kombinas la originajn vortojn per streketo: *angla-franca* vortaro; la *direktoro-administranto* de la kompanio; ilia agado estas nur *ataki-retroiri*. (*Anglofranca* vortaro estus vortaro de francaj vortoj influitaj de la angla lingvo). Ne, en vortformado temas pri pli ol tio: unu parto estas la ĉefelemento kaj la aliaj partoj difinas, determinas, plivastigas, tiun ĉefelementon: *laboro* estas -o (= io) difinita per la ago *labori*; *tablotuko* estas *tuko* difinita al certa celo: la *tablo*.

Ekzistas tri reguloj koncerne la vortpluformadon. La unua estas, ke **la ĉefelemento ĉiam troviĝas laste en la kunmetaĵo** (kvankam ekzistas naturaj esceptoj al tiu regulo, klarigitaj poste). Do *akvotubo* ĉiam estas tubo, neniam

akvo, (*akvo* estas la difinanto, nomita “la determinanto”). (Notu ke en la analiza formo la ĉefelemo troviĝas normale en la unua loko: *tablotuko* = tuko por tabloj, do tuko, ne tabloj).

La *dua* regulo estas, ke ekzistas aldonita rilatosignifo inter la ĉefelemo kaj la vortelemo(j) antaŭ ĝi. Tiu rilato estas prepozicia: **aŭ** esprimita de iu (ne gravas kiu) prepozicio en la analiza formo, **aŭ** de simpla predikativa rilato (kiu gramatikfunkcie tre similas al prepozicia), nome “estas”, “egalas”. Do *marfiŝo* estas *fiŝo* en (aŭ de) la *maro*, kaj *domego* estas “*domo* kiu estas *ega*”. Tiu rilato estas la tria signifero en la nova vorto el du radikoj. (Notu ke, se necesa, la prepozicia rilato povas esprimati ankaŭ en la sinteza formo: kastelo sur la monto → surmonta kastelo).

La *tria* regulo estas, ke la kvara, al la kunmetaĵo aldonita, signifero estas la nocio “*speciala*” aldonenda al la ĉefelemo. *Lernejo* ne estas simple “*ejo* por *lerni*”, ĝi estas “*speciala ejo* por *lerni*”, speciale konstruita aŭ celata por lerni. “Tuko por tablo” povas esti iu ajn tuko hazarde uzata sur la tablo, sed “*tablotuko*” estas speciale formita kaj fabrikita por la celo kuŝi sur tablo. *Dometo* ne estas simple malgranda domo, eĉ ne eta domo, sed speciala speco de malgrandaj domoj. Ankaŭ en la etnaj lingvoj oni kutime havas specialajn vortojn por tiaj specialaĵoj (ekz. *cottage* en la angla). Pro tiu regulo ni kapablas krei nur limigitan kvanton de novaj vortoj: ni ne povas uzi “*luneto*” se ni celas “malgranda luno”, ktp. Kvankam ĝia intenseco varias ĉe la diversaj specoj de vortformado, tiu signifero de specialeco, enkorpigita en ĉiun kunmetaĵon, estas grava elemento en la vortpluformado.

Pro tiuj limigoj de determinado (ĉefelemo!) kaj de interrilato (prepozicia!) kaj de aldonenda specialeco, ni kapablas krei nur relative malgrandan kvanton de vortoj, relative al la teoria ebleco krei milionojn da vortoj. Tio tamen ebligas al ni krei la kelkajn milojn da vortoj bezonataj pro la necesaj korespondaj nocioj.

Por ne esti mallogikaj, ni devas zorgi, ke ni ne kreas novajn vortojn por nocioj kiuj ne ekzistas, ekz. *tabli*, *mispluvi*, *malneĝi*, *neĝono*, *boĝardeno*, *sunilo*, *poŝtelo*, *tapiŝino*, *vojluno*, *pardarbo*, *maltrinki*, *transhare*, *libroŝuo*, *vortplanto*, *arbordo*, *boatsukero*, *ranstacidomo*, *lunfiŝo*, *planklakto*, *oa*, *oi*, *ii*, *gesakoj*, *pentraĵido*, *idebesto*, *ŝtupero*, *lanvino*, *vinlano*, *inkmuro*, ktp. ktp. ktp. ĝis milionoj.

Aliflanke ni devas zorgi, ke niaj novaj vortoj diferencas for de la analiza uzo de la partoj de iu kungluaĵo. Tio pleje necesas ĉe la vortkunmetado, kie ni ja kunigas du radikojn. Necesas do ĉiam konscii, ke estas klara signifodiferenco inter *ĝardenplanto* kaj “*planto en (de) la ĝardeno*”, inter *domego* kaj *granda domo*, inter *manĝilo* kaj (hazarda) *ilo por manĝi*, inter *naĝejo* kaj *ejo por naĝi*, inter *vagonaro* kaj *aro de vagonoj*, kaj eĉ inter *domoj* kaj *kvanto da domoj*.

1. Finajŝanĝado.

Ĉe ŝanĝiĝo de la finaĵoj, la specialigado konsistas precipe en ŝanĝiĝo de la (gra-

matika) aspekto de la vorto: ĉi uzi vorton kiel substantivon, verbon, adjektivon aŭ adverbbon, dependas de la rolo kiun ĝi ludas kun la aliaj vortoj, aŭ laŭ tio, kio plej konvenas en la bildo kiun ni deziras krei en nia kaj aliies mensoj. Ankaŭ la plurala -j kaj la akuzativa -n dependas precipe de la aspekto, de iliaj lokoj inter la aliaj bilderoj. Ĉi ĉio tamen estas specialeca uzo, kaj la rilato inter la radiko kaj la finaĵo estas predikativa: ludo estas *o* = “kio estas, konsistas en,” ludi.

En ĉi tiun grupon ni povas klasi ankaŭ la komencaĵŝanĝadon (iel, tiel, kiel, ĉiel, neniel), kvankam Zamenhof decidis, eble saĝe, ke ĉiu el tiuj eblaj vortej estas mem individua radiko.

2. Derivado.

Derivado konsistas en la kunmeto de radiko kaj afikso (krom la necesa finaĵo). Ankaŭ ĉi tie aplikiĝas la regulo pri specialeco: klubano ne estas *simple* iu kiu estas membro de klubo, sed ŝi/li samtempe apartenas al speciala socia grupo aŭ klaso, tiu de la klubanoj. Sed tiu ĉi regulo pri specialeco ne ĉiam estas same certa ĉe la derivado kiel ĉe la aliaj kunmetadoj. Ankaŭ la regulo pri la rilato inter la du elementoj estas iomete malsama: temas pli pri adjektiva rilato; cetere la adjektiva funkcio samas al la prepozitivo. Tiel *gefratoj* estas geaj fratoj, *reveni* estas ree veni, kaj *domego* estas ega domo, en analiza formo (kun nuanco de diferenco).

Bedaŭrinde, sed neeviteble, ekzistas du specoj de afikso: la t.n. afiksoj veraj kaj la t.n. afiksoidoj. Ambaŭ specoj modifas la signifon de la ĉefradiko, en ambaŭ specoj validas, kvankam malforte, la reguloj pri specialeco kaj pri prepozicia rilato; sed en la *afiksoj veraj* validas la kontraŭa determinado ol ĉe la *afiksoidoj* kaj ĉe la du aliaj klasoj de vortpluformado.

La esenca karaktero de derivado (ja per afikso kun radiko) do estas, ke la determinad-direkto estas la kontraŭa al tiu de la vortkunmetado (per radikoj nur). Ĉe la lasta, la kerno, la determinato, de la kunmetaĵo estas la lasta elemento de la nova vorto, dum ĉe la *afiksoj (veraj)* la kerno, la determinato, estas la unua elemento. Dum *dompordo* estas *pordo*, ne domo, la derivaĵo *domego* estas *domo*, ne ego. Same la *artamo* estas *amo*, ne arto, sed la *malamo* estas *malo* pri io (ami), ne la amo mem. La *afiksoidoj*, aliflanke, sekvas la determinadregulon de la radikaj kunmetaĵoj, kvankam cetere ili kondukas kiel afiksoj.⁵

Ne estas la kulpo de Zamenhof, ke ni havas en Esperanto du specojn de afiksoj: kulpas la aglutinaj lingvoj, kiuj disvolviĝis tiel, kaj kies disvolviĝon ni ne povas renversi en Esperanto. Estus pli logika, havi du apartajn nomojn por la du specoj de derivado, sed ĉar la nombro de afiksoj veraj estas tre malgranda, oni normale kunigas ambaŭ specojn sub unu nomo: afiksoj aŭ derivado, ĉar ĝenerale ambaŭ aspektas similaj en formo kaj funkcio. La prefiksoj veraj estas: bo, eks, ge, mal, pra. La sufiksoj veraj estas et, eg, aĉ, um. Ĉiuj aliaj t.n. prefiksoj kaj sufiksoj

5 **Nota de la redaktoro:** kvankam ĉi tiu parto 2 ŝajnas tre kompleksa, ĝi atentigas pri gramatika afero tre grava en la esperantologio — gramatika fenomeno kiu perpleksigas multajn “progresintajn” lernantojn. Ni tial rekomendas studi ĉi tiun parton de la artikolo tre zorge. — [d]

estas prefiksoidoj kaj sufiksoidoj — ĉe ĉi tiuj la determinato estas ĉiam la lasta parto (radiko ĉe la prefiksoj, afikso ĉe la sufiksoj). Ne estas esceptoj al la reguloj por la derivaĵoj.

3. Vortkunmetado.

Ĉe la kunmetado de du aŭ pli da radikoj validas kutime **kaj** la regulo pri la prepozicia rilato inter la elementoj, **kaj** la regulo pri la determinad-direkto (la lasta elemento estas la kerno, la determinato), kaj la regulo pri la specialeco de la ĉefelemento.

Ne ekzistas esceptoj al la grava regulo pri specialeco, nek al tiu pri la prepozicia rilato (laŭ kiu ĉiu kunmetaĵo, ja sinteza, elvenas el [ja analiza] prepozitivo [aŭ predikativo]). La kvar esceptoj okazas ĉe la regulo pri determinado. Ili estas sistemaj esceptoj, kaŭzigitaj de la funkcionmaniero de nia menso, kaj Zamenhof ne povas kulpigati pri tio.

La *unua* estas ke oni malinkluzivigas la pronomojn kiel ĉefelementojn kaj, kutime sed ne ĉiam, ankaŭ kiel flankelementojn. La tialo estas la mallongeco de la pronomoj. Oni do ne diras pri du personoj, li sur la tero kaj ŝi en la akvo, ke ili estas *terli* (aŭ *terlio*) kaj *akvoŝi* (aŭ *akvoŝio*). La vortoj ne plu estus rekoneblaj. Same pri aliaj pronomoj, eĉ la korelativoj. Tre malofte oni renkontas kunmetaĵon kun pronomo kiel flankelemento (neniam kiel ĉefelemento): la *tielnomato* (kontraŭ “la tiel nomata”); ankaŭ la vortoj *kioma*, *tialo*, *tiea* kaj *iele*. La numeraloj inter si havas apartan, verprefiksosimilan, regulon (*dudek* = du dekoj), kaj cetero kondutas jen kiel adjektivoj (la *dutura* katedralo), jen kiel substantivoj (*duoblo*).

Dua kazo estas, kiam la flankelemento estas sufikso; en tiu kazo, ree pro mallongeco kaj nereconebleco, oni metas streketon inter la du elementoj: *il-fabrikado*, *in-necesejo*, ktp.

La tria kazo temas pri la prepozicioj, se ili estas la determinatoj. En tiu kazo oni simple renversas la vicordon: oni uzas “*eksterlandaj* turistoj” anstataŭ la logika “*landeksteraj* turistoj” (logika, ĉar la turistoj ne estas de nia lando, sed de la ekstereco ekster nia lando); same “*surmonta* flago” anstataŭ la logika “*montsura* flago”, kaj *antaŭmanĝa* trinko (kiu devus esti *manĝantaŭa*, ĉar la trinkado ne estas manĝa, sed antaŭ io, antaŭa). La tialo por ĉi tiu necesa escepto estas ree la mallongeco, ĉikaze de la prepozicioj, kaj la el tio sekvanta nekomprenebleco.

La kvara kazo estas normala en la sinteza formo, sed nenormala en la analiza formo. Ĝi koncernas la adjektivojn: dum normale ni diras “la *bluroba* virino”, kie la ĉefelemento estas “roba” difinata de “blu”, ni en la analiza formo kutime, kvankam ne devige, metas la determinaton same post la aliajn elementojn: la blua robo, dum normale ni faras la kontraŭon pri suplementoj: robo kun blankaj randoj. Pro ĝermana influo Zamenhof transplantis nelogikan vicordon al Esperanto: ni devus ĉiam en la analizaj esprimoj meti la adjektivon post la substantivon, por esti konsekvence aglutinecaj, dirante “la robo blua”, “la espero vana,” ktp. Estas stranga, ke Esperantistoj el etnaj lingvoj uzantaj la ĝustan vicordon aŭtomate

ŝanĝas sian kutimon en Esperanto (sen neceso aŭ devo) kaj uzas la nelogikan kutimon. Sendube Zamenhof parte kulpas pri tio, sed li almenaŭ lasis nin liberaj elekti nian preferon.

La klasoj de kunmetado.

Pro naturaj kaŭzoj, iuj vortformadoj eblas kaj aliaj ne. La finaĵo -j kunmetatas kun substantivoj kaj adjektivoj nur (*varmaj piedoj*). La finaĵo -n povas kunmetati kun substantivoj, adjektivoj, kaj adverboj, sed ne kun verbaj formoj (*altajn domojn; hejmen*).

La kategoriaj finaĵoj povas kunmetati kun iu ajn radiko aŭ afikso (sed nur se koresponda nocio ekzistas), sed ne kun alia kategoria finaĵo (*varmao, *varmoa, ktp).

Ĉiu afikso havas sian propran kunmetebilon, depende de la signifo. Ekz. eblas *manĝilo*, sed ne *harilo*, kaj *reveni* sed ne *retablo*. Krome kelkaj kunmetebilas kun substantivoj, adjektivoj, kaj verboj (ekz. um), kaj aliaj nur kun du kategorioj (ekz. -ec nur kun adjektivoj kaj substantivoj); la ceteraj nur kun unu kategorio (ekz. -il nur kun verboj).

Principe ne eblas kunmeti ĉefelementan substantivon kun ĝia adjektivo, nek ĉefelementan verbon kun ĝia adverbo aŭ kun ĝia gramatika objekto. La tialo estas, ke mankas tie la ekstra nocio “speciala”, kaj do ne plu eblus distingi inter ekz. dikfingro por dika fingro (sen speciala nocio) kaj dikfingro (= speciala fingro dika). Ja estas klara diferenco inter dika fingro, iu ajn fingro, kaj *dikfingro*, kiu estas speciala speco de fingro. Same pri la adverboj kaj la objektoj ĉe verboj. P.A.G. ĝuste kaj forte rekomendas ne krei pliajn tiajn kunmetaĵojn iniciatitajn de Zamenhof, por ne ruinigi la vortformadprocedon en Esperanto (§ 423).

Ni konsciu tamen, ke tiaj nelegitimaj kunmetoj eblas, se la kunmeto alikategoriĝas aŭ deriviĝas. Dum ne eblas diri *ruĝrozo* nek *belvesti* nek *fiŝmanĝi*, ni povas uzi *ruĝroza* bedo, belvestito, kaj *fiŝmanĝanto*. Tio eblas, ĉar ĉe tia ŝanĝo la nova finaĵo au alia ĉefelemento ricevas per tiu procedo karakteron de specialeco. Tiu specialeco ne estis en la proprakategoriaj formoj, ĉar ili estis ĝeneralsencaj.

Speciale riĉa formo de pluformado en Esperanto, ne ofta en ĝermanaj aglutinaj lingvoj, estas tiu kun adjektivoj kaj adverboj: La virino en la blua robo → la (en)bluroba virino; Ili promenis en la ĉefa strato → ili promenis (en)ĉefstrate; Ŝi skribas per sia maldekstra mano → ŝi skribas (per)maldekstromane. Tiuj popularaj esprimoj ofte estas nenaturaj, ĉar mankas la specialeco: ili ja ne ĉiam reprezentas unuecajn nociojn, kaj tial ne havas en etnaj lingvoj specialajn vortojn. Estas malfacila imagi, ke “bluroba” estas speciala karaktero, kontraŭe al “maldekstromane”, kiu nocio ŝajnas specialaĵo (komp. maldekstromanul(in)o, ktp.) □



DIVERSAĴOJ

El coche de pedaloj [“La pedal-aŭtomobilo”] estas la nomo de nova filmo hispana, direktita de Ramón Barea. Priskribo de ĝia enhavo: “La filmo alportas nin al la epoko en Hispanio de la reĝimo de Franco, en la jaro 1959, en malgranda vilaĝo dum la Sankta Semajno.

La familio de la ĉefrolulo de la filmo estas: edzino, du filoj kaj unu filino. Profesie li mastrumas Akademion, kie li instruas Esperanton. En la klasejo de la instruado estas granda portreto de Ludoviko Zamenhof, kaj la gelernantoj portas sur siaj jakoj verdan stelon.

La familia ekonomio de la protagonisto estas tre malbona, ĉar la gelernantoj ne havas monon por pagi la studadon. La patro ankaŭ helpis la familian ekonomion laborante kiel reprezentanto de entrepreno *ROCA* vendante sanitariajn materialojn, sed tio malbone sukcesas, ĉar li politike estas maldekstrulo — kontraŭ la reĝimo.

La protagonisto kunvenas eksterleĝe kun aliaj maldekstruloj kaj en la kunveno havas sur la muro grandan portreton de Zamenhof, kaj kiam ili suspektas ke la polico inspekos, ili turnas la zamenhofan portreton kaj aperas dorse la portreto de Franco. [Dum la reĝimo de Franco, Esperanto estis malpermesita en Hispanio.]

La malgranda filo de la familio, naŭjaraĝa, petas al sia patro ke li aĉetu pedalan aŭtomobilon, kiun li vidis en montrofenestro de butikoj. Bedaŭrinde, la financa situacio de la familio ne permesas aĉeti ĝin.

[Laŭ KAE-*Informilo* mar-jun 2004.] □

Georges Lagrange: Kun granda bedaŭro ni informas ke Georges Lagrange, Esperanto-verkisto, akademiano, franca esperantisto, membro de FEI (Franca Esperanto Instituto), kungvidinto de la Esperanto-centro Kvinpetalo, forpasis la 30-an de aprilo en Bouresse. Li estis 75-jaraĝa. — Li estis la verkinto de la romano *Surklifa*, unu el la ĉefverkoj de la lastatempa esperanta literaturo (recenzo en *ESK* 47 Septembro-Oktobro 2000), kaj de aliaj krimromanoj. □



Por Ridigi Vin



Ne estas facile devi prizorgi infanojn tutan semajnon. Tion mi faris pasintan semajnon. Tamen, ĉio iris glate ĝis iun vesperon mi devis bani la plej malgrandan. Mi metis lin en la bankuvon kaj diris:

“Jen vi vidas, tre bone, ĉu ne? Ni ne bezonas Panjon!”

“Jes”, respondis la bubo, “sed kutime Panjo deprenas miajn ŝuojn antaŭ ol meti min en la bankuvon!”

[E] *Tamen Plu*] □

EL LA REGIONOJ

ACT: Je pasko estis renkontiĝo de kelkaj esperantistoj dum la nacia folkloro festo en Kanbero. Bernie Heinze kaj Franciska Toubale el Viktorio, Terry Manley kaj Alan Dean el NSK, Ŝandor Horvath kaj Helen Palmer el S.A., kaj Kay Anderson el Kvinslando partoprenis en la festo. Bedaŭrinde ne multe da tempo disponeblis por esperantaj aferoj pro la plena programo de la festo kaj la respondecoj de la grupo pri familioj kaj laboro ĉe la festo. Malgraŭ tio iuj renkontiĝis de tempo al tempo kaj Franciska intervjuis Terry-on por 3ZZZ pri la historiprojekto kiun li prilaboras.

Ŝandor kaj Helen ĉeestis dum unu tago sed pro la homamaso ne vidis alian esperantiston.

Bernie kaj Franciska estis volontuloj por helpi antaŭ la festo kaj dum la festo. La festo dependas de armeo da volontuloj kiuj helpas pri starigo de tendoj, konstruado de dancoplankoj kaj podioj, muntado de elektraparatoj, deĵoro ĉe enirejoj, perdaĵejoj kaj muzikilsekurejoj, kolektado de rubaĵo kaj multegaj aliaj aferoj. Sen la helpo de tiuj volontuloj la festo ne povus sukcesi. Ĝi ja estas tre bona ekzemplo de kuna laboro por komuna celo. [Laŭ *Telopeo* majo 2004]

NSW: Artikolo aperis en *Pharmacy History Australia* vol.2 no.1 March 2004, Journal of the Australian Academy of the History of Pharmacy, sub la titolo “De la apotekisto ĝis la farmaciisto dum la pasintaj sesdek-kvin jaroj en Novsud-Kimrujo kiel rigardata per la okuloj de unu sola farmaciisto” de Sid Wolifson (prezidanto de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo). [Laŭ *Telopeo* majo 2004]

NEKROLOGO: TERESA METHERRALL

verkis Jennifer Bishop

Teresa (Teri) Metherall, naskita la 20an de Julio 1923, edzino de Murray dum 52 jaroj kaj lasante fratinton loĝantan en Usono, forpasis la 18an de majo post eksuferi apopleksion. Lerneĵano Teri vizitadis la lernejon Caulfield Grammar, kaj poste, en 1941, aniĝis al la flugarmeo. Dum tri jaroj ŝi laboris kiel helpĉifristo. Teri esperantistiĝis en la 50aj jaroj post renkonti la fraton de amiko, ĵus revenintan post vojaĝo per Esperanto tra Eŭropo. Ŝi fariĝis bona kaj malavara esperantistino, kiu ankaŭ multe vojaĝis por partopreni en kongresoj kaj viziti Esperanto-amikojn. En 1988 ĉe UK en Roterdamo, Teri fiere anstataŭis D-ron Ralph Harry por akcepti lianome la Premion Onisaburo Deguci. Tamen ne nur Esperanto altiris ŝin al la norda hemisfero, ankaŭ ŝia avida interesiĝo pri la geneologio de ŝia familio, pro kio ŝi ofte haltis en Londono por konsulti arkivojn ktp. Dumlonge membro de AEA kaj Melburna Esperanto Societo, la membraro sentos la mankon de Teri, sed danke al ŝia edzo granda kolekto da libroj heredatis por la biblioteko, kiu rememorigos nin daŭre pri ŝi. Restu en Paco, Teri! □

Pseŭdlobokserp

Spritaj splitoj kaj preskeraroj
el la kolekto de la reduktoro

Reago el Sisterono

Demando: Ĉu vi posedas diplomon aŭ ateston pri via scio de Esperanto?

Bv. precizigi.

Respondo: Ŝatus min tion.

(Kataluna respondo al UEA-enketo, 1991)

El popola la cervo

En la kategorio de Monda Herdaĵo troviĝas...

(Flugfolio Kroatio, la renaskiĝanta lando)

Sekcu la Majstron

Diskunigu la vivon de Zamenhof per tiu ĉi teatraĵo.

(Valencia Luno, 1992, jan.)

Ĉeĥio marŝas en insekta mondo?

Por 1992 ni planas la aperigon de ĉeĥa numero kaj de blata numero de ILTIS-Forumo.

(Cirkulero 1992-02-22 de ILTIS)

Vo ne vacilas por vinnoj

Post la devio de UEA en novembro finnaj esperantistoj donacis jam pli ol 3000 markojn por ebligi estonojn membriĝi en UEA.

(Esperantolehti 1992: 2, pĝ. 9)

Spertita sur la haŭto

La “mirkalon de la unua kongreso”, spertitan de ni ĉiuj, ne eblas resumi en unu titolo.

(Esperantolehti 1992: 2, pĝ. 37)

Festo en necesejo?

Paŝo post paŝo beliĝas nia Berlina Esperantodomo. (...) estas pretigata unu el la subtegmentaj ĉambretoj, tiel ke tie baldaŭ povas tranokti esperantistoj laŭ pasportservaj kondiĉoj. Aldone al ĝi oni refunkciigasunu el la ŝtuparejaj necesejoj, aldonante al ĝi ankaŭ lavujon. Tiu ŝtupareja necesejo servos ankaŭ por organizotaj festoj kaj renkontiĝoj en la Berlina Esperantodomo resp. en ĝia

6 Nia kunlaboranto Odlo Bokserp nun bieras en kaverno en la sudorienta parto de Insulo Sankta Georgo (parto de Bahamoj), partoprenante en Internacia Kongeso de io... Ĝis lia reveno, ni prezentas verkon de lia prapraprapraprapraftrato.

korto.

(*Berlina Informilo*, 2002, okt.)

Poeto stumblaĉis tra monto kaj val'

En Permo loĝis ankaŭ aliaj rusaj verkistoj, kiel poeto-fituristo Kamenskij, Korolenko, Mamin-Sibirjak.

(*Rande de Eŭropo*, flugfolio de Nikolai Lozgaĉev)

Libero: ĉu ion el onet'?

“Buller kaj kompanio” (...) ĝuste helpis eviti oficejan paralizon: mi mem, ekzemple, instigis amikon Ionel Onet interesiĝi pri laboro en nia liberoservo.

(<http://groups.yahoo.com/group/esper-inform/message/968>)

Ekumene

Estimataj samdianoj

(Retmesaĝo de Miyosi Etuo, 29 jan. 2000)

Ledon ĉi tie, Ledon tie, Ledon ĉie

La programo de la Forumo en Vraca enhavis ankaŭ koncertojn, promocion de la Premio La Verko de la Jaro... sinprezenton de esperantaj ledonejoj kaj gazetoj, viziton al la urba muzeo...

(*Heroldo Komunikas*, 7 jun 2000)

Menuo HELPO: Sanga krespo

HELPO-Foundation estas evoluprogramo, kies bazaj ideoj krespas el la principoj de rektaj interhomaj kontakto kaj helpo, kaj de profunda kompreno pri si mem kaj intersango kun aliaj.

(Letero de Tübingen Esperanto-grupo)

Menuo UEA: Sovaĝa porko

Kara William, la Jarlibro nepre aperos. Neniu pensis ne aprigi ĝin.

(Renato Corsetti, retmesaĝo 6 okt 2002, Temo: La Jarlibro estas dissendita)

Ĉiam eblas pli kloake

Kion vi sugestus por plie fekigi la reciprokan kontribuon de UEA kaj REU?

(*Moskva Gazeto*, 1992: 2)

Eĉ naskitoj mortas

NN ... mortis la 30-an de novembro 2003 en Napolo... Lerninte Esperanton en 1955, la naskita siciliano gvidis lokan grupon... (*Esperanto*. 2004: 4)

Kolektis István Ertl [el *La ondo de Esperanto*] □

La Aŭstralia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.au>

Prezidanto: *Matthew Maguire*, 9 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

Vicprezidantoj:

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249;
sandor.horvath@unisa.edu.au

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122;
esperanto@education.monash.edu.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com

Helpsekretario: **Henry Broadbent**, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731. henry_b@peninsula.hotkey.net.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. pitney@goldenit.net.au

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 for familianoj) ĉe la sama adreso; \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Sendu vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, ĉe la asocia adreso. bradley.m@xtra.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt*, ĉe la asocia adreso. hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Sendu vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 📠 (08) 9641 1134.
sudakruco@sudakruco.org

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ĜN* on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ĜN*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtosendokosto; por nemembroj, \$4.25+ poŝtosendokosto. Menu de la Libroservo.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto *ael-w* ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas © 2004 de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata.

Ĉi tiu numero de *ĜN* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparoj uzitaj estas Times kaj Helvetica Neue.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T. (nun bieranta en Bahamoj)

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid

to

D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

Esperanto sub la Suda Kruco
Vol. 12, No.4, Julio-Agusto 2004

Print Post Approved
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA